Jes, Avino

Verkita de Alekso MILLER

(Avino sidas en seĝo en salono kun libro kaj parolas per telefono al sia nepino Ĵonja.)

AVINO: Ĉu vi aŭdas min, Ĵonja?

(En kuirejo Ĵonja kaj ŝia amikino ordigas kaj purigas aferojn dum la telefonado.)

ĴONJA: Jes, avino.

AVINO: Do… ĉu vi trovis koramikon?

ĴONJA: Ankoraŭ ne.

AVINO: Nu, ne forgesu…

Tiu, kiu ne scias,
kaj ne scias, ke li ne scias,
estas stulta – evitu lin!

ĴONJA: Jes, avino.

AVINO: Sed…

Tiu, kiu ne scias,
kaj scias, ke li ne scias,
estas humila – instruu lin!

ĴONJA: Kompreneble, avino.

AVINO: Tamen…

Tiu, kiu scias,
kaj scias, ke li scias,
estas saĝa – sekvu lin!

(La amikino de Ĵonja mane kovras la telefonon kaj mallaŭte interrompas la konversacion.)

AMIKINO: Pri kio ŝi parolas?

ĴONJA: Mi ne scias.

***** La Fino *****